



Normanda Esperanto Bulteno



BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO.
- JUIN 1970 -

N° 12

Redaktas : S-ro E. JOUIS - 62I, rue Georges Mugnier - 76 - BOISGUILLAUME

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de Februaro, 10-a de Majo,
10-a de Aŭgusto, kaj 10-a de Novembro.

ENHAVO :

Kongreso en Les Andelys
Iom da historio pri nia Normanda Ligilo
Anekdotoj
Vivo de la grupoj
Ekzamen-dato
Faktoj pri Esperanto kaj komerco
L'Esperanto : une langue pour l'Europe
Kotizoj

La Normandaj Esperantistoj kongresis.

La 4an kaj la 5an de Aprilo okazis en Les Andelys la 1a Kongreso de la Normanda Federacio de U-F-E.

En vetero ne tre bela, sed tamen akceptebla, la kongresanoj komencis alveni sabate posttagmeze al la urbodomo, kie, je la 15a horo, malfermiĝis la akceptejo en la halo bele dekoraciita per tre interesa filatela ekspozicio.

Kunveno de U-N-E. Je la 16-a horo, dum aliaj kongresanoj partoprenis viziton de la urbo okazis samtempe kunveno de la estraro de U-F-E; kaj en alia salono, kunveno de la membroj de U-N-E. Bedaŭrinde, ĉar multaj kongresanoj ankoraŭ ne estis alvenintaj kaj aliaj preferis viziti la urbon, la ĉeestantaro konsistis el nur 8 personoj, el kiuj 4 estraranoj. Pro foresto de nia Prezidanto S-ro Huet, la vicprezidanto malfermis la kunvenon kaj bedaŭris la malmultecon de la ĉeestantaro pri kiu kulpas ne nur la netaŭga horo, sed ankaŭ la indiferenteco de la anoj. Poste S-ino Pottier, sekretario, legis la raporton pri la pasinta kongreso kaj la moralan raporton en kiu ŝi sciigis, ke la nombro de niaj anoj ne kreskis de post la kongreso en Yvetot; la problemo de la bulteno estis ne solvita dum la kongreso, sed S-ino Vincent bonvolis poste akcepti tiun taskon; la kongreso planita por la jaro 1969 ne okazis pro rifuzo fare de la estraro de U-N-E, havi komunan kunvenon kun tiu de la Normanda Federacio, cele al preparado de komuna kongreso; kritikoj kaj disputoj fine de 1969, neutile, ĉiudie la Normandajn Esperantistojn kaj provokis la demision de la bultenistino; en la estrara kunveno okazinta en Yvetot la 28-an de Februaro, Ges-oj Pottier akceptis provizore zorgi pri la bulteno en kunlaboro kun S-ro Jouis; resume, nia asocio estas nun minacata je dormo pro nesufiĉa entrepreno de siaj anoj, internaj disputoj kaj manko de bultenistino; al tiuj 3 problemoj la kongreso devos trovi solvon.

S-ro Pottier komentariis la raporton kaj rimarkigis, ke multaj Normandaj Esperantistoj ne aliĝas la U-N-E; pro nesufiĉa propagando. Poste la ĉeestantoj longe diskutis pri la rilatoj inter U-N-E kaj la Federacio, kritikis la rifuzon de komuna estrara kunveno, ke neniu interkonsento por kunlaboro ne povis okazi ĝis nun. Ili ankaŭ diskutis pri la bultena problemo, S-ro Jouis akceptis zorgi pri ĝi ek de la venonta numero.

Post tiu diskutado, nia kasisto, S-ro Jouis parolis pri la kaso, kiu nun estas en tre bona stato, ĉar la asocio elpezas nur por publikigi la bultenon.

La ĉeestantaro ĉefitis en ĉiuj kongresoj okazu ĉiujare kaj ne estu nur amikaj renkontiĝoj, sed ankaŭ laborkursidoj kaj estonte, U-N-E, amike kunlaboru kun la Federacio kies celoj ne estas nek konkurencaj nek kontraŭaj al ĝiaj celoj (ĝi helpas la kolektadon de la kotizoj al U-N-E kaj ebligas al la Normandoj voĉdoni pri la decidoj de tiu organizo), kion cetere pruvas ke pluraj personoj estas samtempe estraranoj de ambaŭ organizoj!.

Fine, pro la nesufiĉa nombro de la ĉeestantoj kaj precipe pro la fakto, ke tiu kunveno ne estis anoncita, kiel "ĝenerala", oni decidis atendi ĝis la venonta kongreso por reelekti la estraron.

La Katolika Diservo: Je la 18-a horo okazis, en la kapelo Sankta Jozefo, la kongresa meso. Unuafoje en la historio de la Normandaj kongresoj, tiu meso estis celebrata tute en Esperanto. Efektive ĝis antaŭ nelonge oni rajtis uzi nur la latinan por la ĉefaj partoj de la meso. La novaj leĝoj de la Katolika Eklezio nun permesas la uzon dum la tuta meso, eĉ por la konsekrado, de la naciaj lingvoj kaj ankaŭ de Esperanto, kiu oficiale havas pri tiu punkto, tute egalajn tajtojn kiel la aliaj lingvoj.

La Orienta Vespero: Je la 21-a horo, la kongresanoj povis aŭskulti tre interesan prelegon de nia Indonezia samideano Sinjoro Eriko Sunardo, ambasada-sekretario, kiu prezentis kaj komentariis lumbildojn pri sia lando kaj poste plej afable respondis la multajn demandojn de la ĉeestantoj.

La Ĝenerala kunveno de la Federacio: Dimanĉon matene je la 9a malfermiĝis la Ĝenerala kunveno de la Federacio. S-ro Jouis, prezidantojŭj donis la parolon al S-ro Albault, prezidanto de U-F-E, kiu brile demonstraciis la lokon de Esperanto inter la aliaj lingvoj kaj klarigis kiel, iom post iom, ĝi evoluis de projekto al vivanta kaj kultura lingvo, por kiu ni devas entuziasme labori, ĉar ĝi povas unuigi la cerbojn kaj la korojn.

Poste S-ro Pottier, sekretario, prezentis la prokolon de la lasta Ĝenerala kunveno, la moralan raporton. De post la Ĝenerala kunveno en Evreux okazis interŝanĝo de leteroj kaj estrara kunveno en Sotteville por la preparado de la kongreso. La membraro malkreskis, sed tre malmulte (108 anoj nun). Post la morala raporto, S-ro Vincent montris, per la financa raporto, ke la stato de la kaso estas bona.

Post la raportoj pri la agado de la grupoj, 2 estraranoj, kies mandatoj finiĝis: S-ro Lavallée kaj S-ro Lecomte, estis reeloktitaj de la ĉeestantaro.

Tiam oni diskutis pri la raporto pri la agado kaj financoj de U-F-E. kiu estis plene aprobita. Fine estis decidite ke S-ro Jouis aŭ S-ro Lavallée reprezentos la Federacion al la nacia kongreso en Montecarlo kaj ke la venonta kongreso okazos, komune kun tiu de Ile-de-France, en Pontoise, fine de Aprilo 1971.

Vizito de la subprefekto kaj de la urbestro. S-ro Granveau, subprefekto kaj S-ro Tomasini deputito urbestro honoris la kongreson per sia vizito je la fino de la mateno kaj klare montris sian simpatian al Esperanto. D-ro Albault prezentis al ili S-ro Sunardo; kaj fine ambaŭ ricevis la libron "Normandaj Rakontoj" de Guy de Maupassant, memore de la kongreso.

Fino de la kongreso. Je la 12a, la kongresanoj iris al restoracio por komuna tagmanĝo kaj fine post interesa vizito al la Kastelo Gaillard, kie oni faris la oficialan foton, la kongresanoj disiĝis, gardante rememoron pri bela kongreso, kies sola riproĉo estas malmuteco de la partoprenantoj (nur 54 aliĝintoj).

Estonte la Normandoj devos montri sian viglecon pli amase aliĝante al la venontaj kongresoj.

IOM DA HISTORIO PRI NIA NORMANDA LIGILO

----- E. JOUIS -----

Esperanto havas profundajn radikojn en Normandujo. Estus tro longe fari kompletan historion de nia provinca movado. Ni nur lumigos kelkajn punktojn, foliumante niajn malnovajn bultenojn.

La grupo en ROUEN estis fondita je Aprilo 1904, ĉe la fino de konferenco de Sro CART, Universitata Profesoro, farita sub la aŭspicio de la Ligue de l'Enseignement.

Jam, la 2 an de Aŭgusto, okazis eta internacia renkontiĝo, kie estis francoj, angloj, germanoj.... Oni ankaŭ baldaŭ eldonis presitan bultenon kiu daŭris ĝis la unua mondmilito.

Kiam la movado restariĝis, oni denove eldonis bultenon, kiu daŭris ĝis Februaro/Marto 1940, kun la N° 50. Ĝi titoliĝis: "Bulteno de la Esperantista Federacio de Normandujo", kaj surhavis 2 siglojn: S.F.P.E. kaj I.E.L., ĉar je tiu momento, U.E.A. estis kontraŭbatita de la Internacia Esperanto Ligo. Iom malluma afero!

La presisto-respondeculo estis nia bona amiko: Sro PARRINGTON, kiu ankoraŭ vigle interesiĝas al Esperanto. La materian preparon de tiu periodaĵo faris Fino TINEL, el Les ANDELYS.

Post la dua mondmilito, nia bulteno reaperas komence de 1946. La zorganto estas Sro DIEUDEGARD, el MAROMME (apud Rouen).

Ĉe la Bulteno 5 a, Sept/Okt. 1946, okazas ŝanĝeto klarigita de Sro DIEUDEGARD sur la fronta paĝo. Jen kelkaj frazoj:

"...kelkaj samideanoj skribis al ni por demandi: Ĉu la Federacio estas nur U.E.F.a, aŭ informilo por ĉiuj samideanoj?" Sro DIEUDEGARD aldonas "Mi mem ĉiam konsideris ĝin kiel informilon pri kaj por la tuta Esperanto-Movado en Normandujo...eble tiu opinio ne estos ĝenerala...". Li fine skribas ke la proksima 16 a Kongreso (EVREUX, la 11 an de Majo 1947) decidis pri la emodde la Bulteno.

En la Marta/Aprila Bulteno, mi, kiel prezidanto de la Normanda Federacio, ankaŭ devis elvoki la demandon. Jen kelkaj frazoj:

"...tamen, malgraŭ tiu frateca laboro, aŭdiĝis vaĉoj, kiuj persiste akcentis ke ne ĉiuj volas aŭtomate aliĝi, pere de nia Federacio, al U.E.F. aŭ I.E.L.. Fakte, kelkaj el niaj plej agemaj kunlaborantoj nur limigas sian apogon al la Normanda laboro...Tio estas la malnova konflikto inter tiuj kiuj preferas kunpuŝi en gravaj neŭtralaj societoj - malgraŭ ke ne ĉio plaĉas al ili - kaj tiuj kiuj ne povas trapasi la limojn de al si fiksitaj baroj pri tiu aŭ alia doktrina punkto..." Mi plue klarigis ke estas proponota en EVREUX, ke estu kreata Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj (UNE) al kiu ĉia Samideano povas aliĝi, kaj kies tasko estos daŭrigi la materian laboron: eldoni Normandan Bultenon kaj organizi Kongresojn....

Mi fine invitis ĉiujn legantojn pripensi la aferon, kaj voĉdoni laŭ sia konscienco en EVREUX.

Oni pli bone komprenos la problemon kiam mi estos dirinta ke, el 100 respondoj de legantoj, 38 estis UFE-anoj, 18 estis SAT-anoj, kaj 3 por UEA (kontraŭ IEL). 41 ne klarigis sian sintenon.

Do, en EVREUX, estis starigita la "UNUIĜO de NORMANDAJ ESPERANTISTOJ" post vigla diskuto.

La unua bulteno de UNE eliris je Sept/Okt. 1947, kaj titoliĝis: "NORMANDA ESPERANTO BULTENO", organe de l'Union des Esperantistes de Normandie.

En 1948, la redaktadon prenis sur sin Fraŭlino MONTEGNE, en EVREUX. Unuafoje vidiĝis la 2 Leopardoj de nia plentalenta desegnisto: Sro BOSC.

Nova komitato estis elektita, kies prezidanto estis Sro BOSC. Nia bedaŭrata amiko HULLIN, en HONFLEUR, estis la kongresorganizonto por 1949.

Fion MONTAGNE longe laboris por la Bulteno, ĉar ŝi ĉesi nur ĉe la N° 35 (Aprilo 1956). Notu ke oni uzis verdan paperon ek de la N° 32 a.

ROUEN

La Esperantistoj asertas ke la internacia lingvo povas esti tre utila por praktikaj rilatoj, kaj kelkaj samideanoj reale ĝin uzas. Ni havas tian personon en ROUEN. Ĉi-poste, je nia peto, Sro BOSCH, Honor-Prezidanto de UNE bonvolis listigi la firmaojn kun kiuj li komercas pere de Esperanto.

MI KOMERCAS PER ESPERANTO

Rigardante al konkreta fakto..... mi uzas Esperanton !
Efektive, la nuna tempo postulas rektan respondon kaj la nova mondo senkompatiĝas. Kiom da kursoj fiaskis pro tio...?

La poezio iom forflugis. Esperanto devas esti PLIE ilo de la Internacia Merkato, tiom pli grava ĉar la momento iĝis taŭga. Ni nepre bezonas ampleksigi la komercan fakon. Ni havos pli da lernantojn kiam ni kapablos pruvi ke oni GAJNAS MONON uzante nian karan lingvon !

Tiujn-ĉi Firamojn mi ofte kontaktis pro varinterŝanĝo :

Libro Servo	Frankston	Aŭstralio
Wade Potteries Ltd	Stoke on Trent	Anglujo
Instituto San Paopo. Banko	Torino	Italujo
Firmao W.M.	Bielefeld	Germanujo
Firmao K. Fotoartikloj	Arnhem	Nederlando
"Bénédictine" (eksportpropagando)	Fécamp	Francujo
Firmao L.B. Porcelenaĵoj	Torino	Italujo
Firmao H.W. Maŝinfabrika	Herford (Westfalen)	Germanujo
Firmao Deak & Co Ltd	(internacia mondvendado)	Hongkong
Firmao G.J.	Sofia	Bulgarujo
Firmao W.M.	Warszawa-4	Pollando
Firmao I.O.	Mozi (HUKuoka-ken)	Japanujo
Firmao A.P.	Tallinn-9	Sovetunio
P.G.N. (aŭtomataj pesiloj)	Eindhoven	Nederlando
R.P. Tapiŝoj	Wellington	Nov-Zelando
Firmao BK ĝenerala komerco	Johannesburg	Sud-Afriko
M.G.C. juveloj	Zürich	Svislando
R.V.	Déin VI	Ĉekoslovakujo
R.G.	Barcelona	Hispanujo

Dum la unua parto de 1970 (ĝis mezo de Aprilo), mi ricevis plurajn informojn :

Germanujo : 7 ; Britujo : 6 ; Bulgarujo : 2 ; Sudameriko : 4 ; Nederlando : 3
Japanujo : 2 ; Svedujo : 1 ; Hispanujo : 1 ; Usono : 2 .

Jam en 1950 mi fondis en Le HAVRE : "Esperanto-Komerca-Servo"n kiu daŭre vivas !

HONFLEUR

Malagrable informo trafis nin : nia simpatia samideano : Sro A. HULLIN subite mortis la unuan de Aprilo, je sia 88a aĝo .

Sro HULLIN estis entuziasmo, kiu fidis al siaj ideoj : Abundeco, floroj,...kaj kiu ĉiam klopodis por Esperanto.

Legante tion, multaj el niaj legantoj certe havos emocian penson al nia bedaŭrata kolego .

SOTTEVILLE-lès-ROUEN

Oni eble plezure scios ke nia amiko Fernand STRUB , kvankam 86 jara, ĉiam interesiĝas al Esperanto, kaj regule aliĝas al UNE . Sro STRUB lernis Esperanton en 1913, do jam de 57 jaroj ! Ni deziras ke nia amiko ankoraŭ longe subtenu nian asocion !

Ebla Kongreso de UNE: En tiu urbeto, kies urbestro estas favora al Esperanto, la tieaj samideanoj esperas ke ili povos organizi kongreson en la jaro 1972 a .

Estis la Havra grupo, kun Sro HUET kiel redaktisto, kiu reprenis la flamon. Kaj poste, Sro MAIMMAUX. Denove Sro HUET kun la N° 56 a, kaj Sro BOSC por la N° 57 a.

Fine, la eldonado revenis al ROUEN por la N° 58 a = Aprilo 1961 kun Sro HANNIER kiel zorganto. La Bultenoj de Sro HANNIER estas rimarkeblaj pro la grandaj desegnoj sur la fronta paĝo. Ni ankaŭ aldonu ke aperis ofte bildoj de Sro BOSC.

Sed, Sro HANNIER devis forlasi ROUEN pro profesia kaŭzo, kaj tiam Sro JOUIS redaktis la Normandan Ligilon, de la N° 68a = Julio 1963 ĝis la N° 74 a = Aŭgusto 1964. Bedaŭrinde, Fino JOUIS, kiu okupiĝis pri la materia farado de la afero, mortis la 1 an de Oktobro, kaj denove la Bulteno aperis en Le HAVRE, dank'al Sro BEAUMONT.

Grava ŝanĝo okazis en Oktobro 1967, kie Sino VINCENT, en Les ANDELYS, bonvolis repreni la publikadon. Ĝi presis ĝin sub nova N° 1, kaj anoncis trimonatan regulan aperadon.

Fakte, la bulteno aperis je ĉa promesitaj datoj ĝis Decembre 1969 = N° 10. Je tiu dato, Sino VINCENT decidis entute sin dediĉi al la restarigo de la Normanda Federacio de UFE, kaj la sekvanta Bulteno N° 11 a, estis preparita de Siĥo POTTIER, en YVETOT.

Jen do preskaŭ senhalta aperado dum 44 jaroj, kun 146 bultenoj, depost la fino de la 2 a mondmilito!

Kio okazos poste, la estonteco tion diros al ni. Mi nur faros finan rimarkon. Malgraŭ 2 militoj, kaj ofte viglaj disputoj, la Normanda Bulteno ĉiam trovis sindonemuloj por antaŭen igi sian nepre bezonatan taskon de ligilo. Ĝi servas al ĉiuj esperantistoj, de kiu ajn horizonto ili venu. De jardekoj, ĝi estas la sola unuiga forto en nia regiono, eĉ kiam la naciaj aŭ internaciaj ĉefuloj sin interatakis. Mi do konfidas ke niaj saĝaj Normanduloj plue kaj daŭre kondukos sian bultenon laŭ sia ĝis nun sekvata paca vojo.

KAJ NUN, PLI GAJAN PROZON...

Estas vintre. La lernantoj vidas tra la fenestroj de la klaso, la neĝon kiu falas. La instruisto faras la scienca lecionon. Li klarigas ke kiam oni varmigas la aĵojn, ili plilongiĝas, kaj reciproke mallongiĝas kiam oni malvarmigas ilin.

Cu iu povas doni al mi ekzempon? Inteligenta knabo levas la fingron: Kiam frostas, la tagoj mallongiĝas, kaj ili pligrandiĝas kiam venas la somero!

En tiu sama klaso, oni plurfoje avertis la lernantojn, ke multaj akvaj mikroboj estas danĝeraj, kaj ke oni povas mortigi ilin boligante la akvon.

Dum alia scienca leciono, la instruisto malkaŝas la misterojn de la bolado. De tempo al tempo, li certigas ĉu la lernantoj bone komprenas.

Kiu povas klarigi al mi kial la akvo bruetas antaŭ ol boli? La sama inteligenta knabo ekparolas: Nu, la mikroboj sentas ke ili devas morti, kaj ili kriegas!

La avo rakontas al nepo la batalojn kiujn li travivis dum la milito 1914/1918.

....kaj jam de tri tagoj, ni havis nenion por manĝi aŭ trinki...nek panon, nek vinon...

Sed vi havis akvon? demandis la nepo.

Akvon, akvon...mi ne memoras. Cetere ni ne havis tempon por lavi nin!

En knabina klaso, la instruistino demandas: Kion ARKIMEDO trovis en sia banujo?

Maneto leviĝas: Li retrovis sian sapon!

YVETOT. La diversaj kursoj bone funkcias kaj alproksimiĝas al sia fino. La ekzamenoj okazos en la Junuldomo la 21-an de Junio je la 9a.

La grupo havis ĝeneralan kunvenon la 9-an de Majo kaj decidis, ke ek de nun estos kunveno la " I-an sabaton de ĉiu monato je la 20h,45" (krom dum la feriaj monatoj) en la Junuldomo.

Krom tio, la grupo preparas la kongreson de S-A-T Amikaro okazonta en YVETOT je venonta Pasko.

LE HAVRE. La Havra Grupo orkanizos, de la 3a ĝis la 8a de Semptembro inkluzive, en Honora Halo de la Havra Urbodomo, ekspozicion " Esperanto en Francujo kaj en la Mondo ", pri la jenaj ĉefaj temoj : Turismo, Komerco, Kampado, Literaturo, Filatelio, k-t-p.

La Normandaj Esperantistoj, kiuj bonvolos ĝin viziti estos bonvenaj.

Lisieux. Pro la tro longdaŭra vintro kaj pro la engripigo laŭvica de la membraro nia grupo iomete malviglis.

Niaj kursoj okazas ĉiulunde en la Domo de la Junularo kaj Kulturo: unu-grada kurso, gvidata de S-ro Brizard, kurso por progresantoj, kiun zorgas S-ro Martin, entute 7 gelernantoj.

Ni provis piknikan rendezuon, la lastan monaton, sed pro malbona vetero ĝi ne kontentige prosperis.

Ni antaŭvidas rendezuon en Saint-Aubin sur Algot, la 24-an de Majo, espereble la printempa suno ebligos pli bonan sukceson; krome, nia Samideano, S-ro Férét pretigas renkontiĝon en Pont-Audemer, la 28-an de Junio.

FECAMP. Mi nur havas unu lernanton, unikan, kiu feliĉebone lernas. Li eĉ havas du korespondantinojn, eksterlande.

VIRE La anoncita kurso (oktobro 1969) ne povis okazi. Neniu venis!.

La Turisma Asocio estas favora al nia afero. Afiŝo pri Esperanto (kun nomoj de S-ro Colleu kaj mi pendis, tre videble, en la Turisma Oficejo (Julio 1969) Esperantlingva folio (stencile) estas baldaŭ eldonita de la Turisma Asocio, (S-ro Colleu zorgas pri tio). Ĝi ankaŭ aperigas reklam-tekston pri VIRE en la Jarlibro de U-E-A 1970.

Artikoloj pri Esperanto sufiĉe ofte aperas en la regionaj gazetoj, (Ouest-France, Voix du Bocage). Mi sendas propagandilojn al emeritaj profesoroj, instruistoj. Sensukcese!!.

Sinjoro intencas partopreni en la Internacia Kongreso de fervojistoj (RIMINI), en la Internacia Katolika Kongreso (BRNO) kaj viziti la Internacian Esperanto Muzeon (Vieno). Lia edzino lernas Esperanton. Ankaŭ mi instruas esperanton al du maljunaj amikoj.

Bedaŭrinde la publiko, la junuloj estas indiferentaj pri nia afero.

EKZAMEN-DATO:

Ekzamensesio okazos en YVETOT. Dimanĉon la 21an de Junio matene je la 9a horo en la Junuldomo.

Ĉiuj, kiuj deziros, povos trapasi tie la jenajn ekzamenojn " ATESTO pri LERNADO, ATESTO pri SUPERA LERNADO, ATESTO pri KAPABLECO ".

Por ĉiuj informoj, bonvolu skribi al Ges-oj Pottier, 50 résidence Tief de Caux. 76-YVETOT.

KONGRESO en MONTEKARLO. (Itala-Franca.)

La 62-a Franca Kongreso okazis la 15/19an de Majo. La vetero estis bela kaj la ekskursoj en Vallauris kaj Tende tre agrablaj.

Ceestis almenaŭ 2 Normandoj, S-ino Lavallée el Le-Havre, kaj S-ro Jouis el Boisguillaume (apud Rouen) kiuj reprezentis la Normandan Federacion.

Pri la administraciaj decidoj, oni legos en Revue Française d'Esperanto Ni diru nur ke estas ĉiam agrable revidi geamikojn el ĉiuj partoj de la lando, kaj ankaŭ kelkajn alilandulojn.

La proksima Franca Kongreso okazos en LYON.

LASTMINUTE-

Ĉar ni ne ricevis sufiĉe frue de la antaŭa bultenstino la adresaron de la abonintoj, ni sendis la numeron IIan de la bulteno laŭ listo de la aŭtoj, kiun ni posedis. Pro tio, kelkaj personoj ne ricevis ĝin ĝustatempe. Ili trovos ĝin kun tiu bulteno. Ili bonvolu pardoni al ni tiun prokraston.

Se kelkaj abonantoj ne ricevis ĝin, ili bonvolu informi nin.

INTERGRUPA RENKONTIĜO. Kiel pasintjare, la grupoj de LE-HAVRE kaj YVETOT renkontiĝos por pikniki lunde la 28-an de Junio en BEUZEUILLETTE, apud BOLBEC en bieno apartenanta al S-ino Peltier.

Se aliaj Esperantistoj volos partopreni tiun renkontiĝon, ili estas bonvenaj.

ATTENTU! Jam de nun, pensu pri la venonta raporto por la bulteno.

VIVO DE LA GRUPOJ (daŭrigo)

LES ANDELYS. Okazos ekszamenstino la 28 - an de majo je la 14-a en la knabina lernejo. Oni disdonos la premiojn kaj diplomojn la 20-an de junio en la urbdomo je la 21-a horo.


Por fermi la ĉijarajn kursojn, nia kulturcentro ekskursos la 21-an de junio al Thoiry, kie ĝi renkontos la parizan grupon. Rende-vue je la 10-a horo antaŭ la enirejo de la kastela parko.

Depôt légal, 2ème trimestre 1970
La gérante Mme Pottier.

Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto d'YVETOT.

ESPERANTO

L'ETOILE VERTE



LE SIGNE QUI RELIE
LES ESPERANTISTES
DU MONDE

*Une langue pour l'Europe
Une langue pour le Monde*

L'EUROPE EST EN MARCHÉ !

Nous désirons tous participer à sa construction, les ESPERANTISTES plus que les autres, pour qui l'EUROPE sera une petite patrie dans la grande.

Mais demain, pour faire face aux échanges multipliés : scientifiques, touristiques, culturels, commerciaux, syndicaux, politiques, etc... devons-nous devenir trilingues, multilingues ?

Certes nos guides parlent merveilleusement plusieurs langues nationales, mais nous, les touristes moyens, les techniciens travaillant sur le tas, les syndicalistes dévoués mais pauvres, nous enfin, les Français moyens qui désireraient cependant avoir de chauds contacts humains avec nos frères européens, quelle que soit leur langue, devons-nous faire les immenses sacrifices de temps et d'argent que requiert la maîtrise des langues, à défaut toujours nous retrancher derrière des traducteurs officiels ou bénévoles, ou à la rigueur, estropier un peu l'anglais, un peu l'allemand, un peu l'italien... ou quoi encore ?

Quelle vaine question ! Il existe l'outil qu'il nous faut pour assurer toutes les liaisons dans tous les domaines. Il a fait ses preuves depuis des décennies, d'éminents savants l'utilisent, des centaines de milliers d'hommes et de femmes de tous rangs sociaux s'en servent tous les jours, par la plume, avec la machine à écrire, par le téléphone... par le contact direct enfin, d'homme à homme, de groupe à groupe, de foule à foule, dans ces extraordinaires congrès internationaux annuels, sans traducteurs, réunissant 2.000 à 5.000 participants. Bref, c'est l'ESPERANTO.

LES ESPERANTISTES SONT RESOLUMENT BILINGUES :

A CHACUN SA LANGUE NATIONALE :

préservée dans sa beauté et dans sa pureté,

POUR TOUS, LA LANGUE INTERNATIONALE :

simple, claire, riche, vivante.

T.S.V.P?

Si vous ne pouvez traverser qu'une seule frontière, alors apprenez la langue qui convient, mais nous vous en prions, apprenez-la bien et avec respect.

Si, par contre, vous souhaitez des relations amicales ou culturelles étendues, alors faites l'effort d'apprendre la langue internationale ESPERANTO.

VOUS EN SAUREZ AUTANT EN 6 MOIS QU'EN 6 ANS
POUR UNE SEULE LANGUE NATIONALE.

Alors, devant vous, s'ouvrira la grande famille des ESPERANTISTES. A TOKIO comme à ROME, à BRASÍLIA comme à HELSINKI... les délégués de l'ASSOCIATION ESPERANTISTE UNIVERSELLE (U.E.A.) en consultation avec l'UNESCO, ou les membres de S.A.T., vous répondront, vous procureront des correspondants de tous âges, de tous rangs et même vous accueilleront si vous visitez leur pays.

70 ans d'extension progressive
une littérature de 8.000 volumes
des centaines de journaux et revues

UNE VERITABLE LANGUE VIVANTE, LUE, ECRITE, PARLEE SANS ARRET

L'ESPERANTO

VOILA CE QU'IL FAUT A UN VERITABLE EUROPEEN,

MIEUX... A UN CITOYEN DU MONDE.

NE JETEZ PAS CE PROSPECTUS -S'IL NE VOUS INTERESSE PAS, REMETTEZ-LE
A QUELQU'UN D'AUTRE.- MERCI.

POUR TOUTS RENSEIGNEMENTS CONCERNANT L'ESPERANTO, ADRESSEZ-VOUS
AU DELEGUE ROUENNAIS :

M.E.JOUIS , 67, rue Georges Mugnier -BOISGUILLAUME